



(★) **AMERICAN ESPERANTIST** (★)

Vol. 53

AMERIKA

ESPERANTISTO

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKO


Joseph Leahy, General Secretary
 Centra Officejo 1517 H Street, N.W. Washington, D.C. Central Office
 J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash. D.C.

 Number Two - \$1. per year-anywhere - 10 cents a copy- December 1938

*Z*A*M*E*N*H*O*F*A* *T*A*G*O* *N*I* *H*O*N*O*R*U* *L*A* *M*A*J*S*T*R*O*

NI HONORU LA MAJSTRON



1859 <i>Naskigis</i>		1887 <i>Unua Esperanto Libro</i>
<i>Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankigante Ni iru la vojon celitan; Eĉ guto malgranda konstante frapante Traborus la monton granitan.</i>	DR. L. L. ZAMENHOF Founder of Esperanto	<i>L' espero, l' obstino kaj la pacienco, Jen estas la signoj, per kies potenco Ni paŝo post paŝo post longa laboro Atingos la celon en glovo.</i>
<i>Unua Kongreso</i> 1905		<i>Mortis</i> 1917



TO THE "MAJSTRO" to whose inexpressible vision, caught at dawn and held to the last ray of a luminous life; to whose quiet, peaceful and untiring personal labor; to whose executive wisdom; to whose personal sacrifice, undying fidelity and flaming zeal for a transcending ideal; to whose boundless love for all human kind and desire to bequeath to unborn generations a priceless gift; to whose linguistic genius and creative achievement, unequalled in the annals of human history-

THE WORLD IS NOW INDEBTED FOR ONE OF ITS CHOICEST INHERITANCES, A PRIZED POSSESSION OF THE WHOLE HUMAN FAMILY. A VERITABLE KEY TO THE HUMAN HEART EVERYWHERE. HIS FAME WILL INCREASE UNIVERSALLY WITH THE YEARS.

X*X*X*X-X*X
 * ZAMENHOF A TAGO--"TAGON de la LIBRO". December 15th, birthday of one *
 * of the world's outstanding geniuses-Dr.L.L.Zamenhof, is celebrated *
 * everywhere with songs, music, games AND BUYING MORE ESPERANTO BOOKS-*
 * a custom started, we believe, by TEO JUNG, editor of "Heroldo de *
 * Esperanto" VIVU FRATO JUNG. Honor Dr.Zamenhof, and add to your know- *
 * ledge, by adding more Esperanto books to your library. *
 X*X
 * AGRABLAJN KRISTNASKAJN FESTO-TAGOJN kaj
 * FELICAN NOVJARON NI DEZIRAS AL ĈIUJ AMIKOJ

X*X*X* L*S*P*E*R*A*N*P*O* K*E*Y* T*O* P*H*E* N*U*M*A*N* H*E*R*O*L*D*O* D*E

ESPERANTO UNIVERSAL

LANGUAGE, TO BE USED IN FILM

By HARRISON CARROLL
Copyright, 1938, King Features Syndicate)



Joseph R. Scherer.

★
Nia
Prezi-
danto
*
Teknika
Direk-
toro
ĉe
M.G.M.

Esperanto, long urged by its sponsors as the Universal Language, is going to make its bow in the movies.

Hollywood is borrowing Esperanto. It was revealed today, to smooth over censorship problems in the new Norma Shearer-Clark Gable picture, "Idiot's Delight."

For a long time, M-G-M hesitated to film the Robert Sherwood play because of the possibility of offending Italy. The studio finally changed the setting to a mythical country and then, to make doubly sure, evolved the idea of the characters speaking Esperanto.

Not all of them, of course.

Miss Shearer, Gable and most of the principals will speak English. Joseph Schildkraut, who plays an aviation officer of the mythical country, will have dialogue in Esperanto and so will most of the background characters.

M-G-M has hired Joseph A. Scherer, leading national exponent of the language, to see that the actors deliver it properly. Scherer says that 4,000,000 people throughout the world can speak Esperanto, and that 10,000 books have been translated into the tongue.

Sample sentence: In Esperanto, "I love you" is "Mi amas vin."

Los Angeles Evening News, Nov. 17, 1938
cine....

● matters

By VIRGINIA WRIGHT
Drama Editor

WHEN MGM ran into difficulties with the Italian government over the filming of "Idiot's Delight," which playwright Robert Sherwood hadn't bothered to make especially polite, the studio hit upon as neat a solution as has ever solved a delicate foreign problem.

With one stroke MGM wiped away all possible objections from Mussolini and assured themselves of a very special audience of 4,000,000 persons for the film. What they did was to make the soldiers in the film speak Esperanto, instead of Italian or any other foreign language. And since this is the first time in the 50 years history of the language that it has been used on the American screen (Europe has used it sparingly), MGM can be sure the world's 4,000,000 Esperantists will go out of their way to see the picture—Clark Gable or no Clark Gable.

president of the North American Association of Esperantists and president of the Los Angeles Esperantists.

* * *
As a lecturer for the last seven years in 48 countries of the world and one of Esperanto's most renowned authors, he is happy to see the language used on the screen. It should destroy the criticism, he believes, that this is an artificial language, to be written, perhaps, but not spoken.

Besides Schildkraut and Feld there are 20 others who must speak the language. And in casting for these parts MGM officials interviewed between 40 and 50 extras who actually were familiar with the language.

It is not a difficult language to learn. Scherer says he can teach anyone, who will study one hour a day, to speak fluently in one month. Evening schools here, at Belmont and Roosevelt, offer five months courses, with classes twice a week, and guarantee proficiency in that time. Scherer, incidentally, used to teach here at Polytechnic.

The word you probably will hear spoken most often in "Idiot's Delight" will be Atenton, which is Esperanto for attention. Doktoro and Medicino you should have no difficulty in translating. But you might have trouble with "Mi amas vin," which means "I love you," or with "Foriru vi granda enuo," which is what the soldier tells Clark Gable who is playing Harry Van on the screen. It means "Go away, you big nuisance."

* * *
In addition to the common soldiers of the invading army (thus denationalized) Joseph Schildkraut and Fritz Feld will speak Esperanto on occasion. To be sure that all the dialog in that universal language would be correct MGM engaged Joseph R. Scherer to translate such passages in the script, and to coach the players who would be called upon to use it.

Scherer, born in Switzerland (which practically makes a man a linguist), is the vice president of the Esperanto Academy

VIVU ESPERANTO,
M-G-M kaj SCHERER!

★★★ ESPERANTO UZATA DE M.G.M. ★★★

Dum 10 jaroj mi rekomendis Esperanton al film-famuloj en Hollywood kaj en aliaj landoj - - kaj FINE venis komenca rezulto. Sed ni ne dormu! Jen

MIRINDA OPORTUNO POR VASTA REKLAMO!

Samideanoj tro ofte plendas pro tio ke gazetaj redaktoroj ne akceptas artikolojn pri Esperanto. Sed NUN ni havas por ili unikan **NOVAĴON** :

"ESPERANTO UZATA EN GRAVA FILMO DE M-G-M., kun CLARK GABLE kaj NORMA SHEARER-kaj pli ol dudek aliaj"

Jen du metodoj :

- A) Donu la novaĵon al viaj lokaj redaktoroj NUN - vidu sur alia paĝo!
- B) Skribu al ĉiu konata ĵurnalisto (Columnists) kaj postulu de li "pliajn informojn" pri la onidiroj (rumors) ke M.G.M. uzas Esperanton en "Idiot's Delight". Diru: "Mi miras ke vi ne jam skribis en via tre interesa kolono pri la afero".

Sed skribu nun en Decembro 1938 ! Jen kio rezultos:

1. La ĵurnalisto devas informi sin pri Esperanto,
 2. Li ne povas moki Esperanton kiam M.G.M. uzas nian lingvon,
 3. Multaj legantoj vidas ke Esperanto nun, estas uzata kaj utila,
 4. Vi kreas seriozan intereson pri Esperanto,
 5. Vi montras al M.G.M. ke la uzo de Esperanto ne nur helpis eviti ofendon al iu lando, sed ankaŭ alportis grandan vizitantaron kaj kroman, senpagan reklamon por la filmo,
 6. Aliaj filmfarejoj vidos ke la "Granda Reklama Valoro de Esperanto" estas vere granda, kaj ili pensos pri uzo de Esperanto por aliaj filmoj.
- Inteligenta kunlaboro postulas KUNLABORON en la SAMA momento - ne post kelkaj semajnoj sed NUN - TUJ - en Decembro 1938 .

Ni ne estu kontentaj! Miaj ripetaj klopodoj alportis komencan sukceson.

Pliaj sukcesoj dependos vaste de la inteligentaj gesamideanoj.

Ne skribu al M.G.M. en la nuna momento..... sed male

en la nuna momento skribu al ĵurnalistoj :

al redaktoroj por doni informojn pri la afero.....

al ĵurnalistoj por postuli pliajn informojn pri la afero.

("IDIOT'S DELIGHT" estas Teatraĵo-

se vi ne sciis-J.L.)

Joseph R. Scherer

COMPARISONs ARE-oh well, this from a seeker after knowledge;" I received the Esperanto textbook, and want to tell you that my impressions of Esperanto are most favorable. The simplicity and logic of the language is simply amazing....I have studied Latin, Greek and Hebrew, and in comparison, the study of Esperanto is mere child's play." J.R.P., Pittsburgh, Pa. CERTAINLY!

Books received: "De Tutmonda Perforto Al Tutmonda Frateco" by G.F.Wates, translated from the English by W.Bailey. 128 pages, cloth binding \$1. Published by the Esperanto Publishing Co., London. The author writes as an orthodox christian, but much truth is found in the presentation of his argument, that since the early days of christianity until the present time the liberty of opinions in religion, as well as politics, is constantly hindered by the use of force, even when this force is applied unconsciously.

.....
"Infanoj Kaj Patrinoj" by Dorothy Canfield Fisher, translated by T.J.Gueritte. 175 pages. Published by the Esperanto Publishing Co., London. Price \$\$. The consideration of changing view points regarding the education of children, by an modern American Mother. Interest-holding for all.

Esperanto vivas tra la Mondo

Denove grava venko ĉe Itala Radio:

Monata bulteno en Esperanto

Komencante de ĵus eldonita 28-paĝa bulteno tute presita en Esperanto, la itala ŝtata organizacio « Ente Italiano Audizioni Radiofoniche » (EIAR) iniciatis regulan eldonon de monataj informoj (programbulteno) tute esperante redaktitaj, de la radiostacio de Prato Smeraldo en Romo, kiu ĉiutage dissendas ĉu paroladojn ĉu koncertojn en diversaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto. La esperantlingvaj dissendoj okazas ĉiulunde per 2 RO (31,13 m.) je proksimume 21.50-22.05 MET, kaj ĉiŝabate per Roma I (420,8 m.) kaj 2 RO (31,13 m.) je 19.01-19.18 MET.

Ne estas necese akcenti la gravecon de ĉi tiu venko de la internacia lingvo en tiel naciisma lando, kiel estas la nuntempa Italujo.

Ni ripetas la jenajn vortojn presitajn sur la verdkolora kovrilo de la bulteno:

La Babela fatalo

Ankoraŭ pri la lingva problemo en München.

En la ĉiutaga germana ĵurnalo « Die Glocke » (La Sonorilo), aperanta en Oelde (Vestfalia), 1.10.1938, ni legas la jenan raporton, kiu tutcerte aperis en multaj aliaj germanaj kaj supozeble ankaŭ alilandaj gazetoj:

La Konferenco de la Kvar en München deruliĝis en la daŭro de dekdu horoj, konforme al la volo kaj deziro de ĉiuj koncernatoj, ke oni povu kiel eble plej frue komenci kaj kiel eble plej frue fini. Tial oni tuj enpaŝis en la interkonsiliĝojn, post kiam la gastoj de la Guidanto alvenis en la Ĉefurbo de la Movado (t.e. en München, kiu estas la sidejo de la naciŝocialista movado. — Red.).

La priparolado dividiĝis je tri partoj: unu okazis en la tagmezaj, alia en la vesperaj, kaj la tria en la noktaj horoj. Oni estus povinta ĉuntiri (t.e. mallongigi) la konversaciojn, se ne pro la diverseco de la lingvoj de l' koncernatoj estus necesa la perado de interpretistoj, kiu kompreneble efikis temporabe, kiel ankaŭ la verĝado de la diversaj dokumentoj okazis kun perdo de tempo, ĉar oni devis kompari ilin, kaj interagordi iliajn formulojn laŭvorte kaj laŭsence.

« Tiu ĉi programo estas ricevebla senpage. La gazetaro bonvole informu pri la apero de la Esperanta eldono kaj rimarkigu la gravecon de la monata broŝuro. Leterojn adresu al: Radiostacio « Esperanta Voĉo », Via Montello, 5, Roma (Italia). »

Kaj ni ne hezitas represi ankaŭ la jenan paragrafon, kiu en la bulteno estas presita ĉe la fino de la programindikoj: « EIAR akceptas kun plezuro la konsilojn, kiujn la aŭskultantoj bonvole komunikos, por plibonigo de la programoj kaj perfektigo de la speciala muzika kaj radiofonia terminaro. »

La novembra bulteno estas presita sen supersignoj; sed ni legas en la bulteno mem ke « venontan monaton oni riparos la mankon uzante la taŭgajn preslitterojn ». Do, pri tio oni ne plendu.

(Heroldo de Esperanto)

Do, ankaŭ en la nuna Germanujo oni plene ekkonas la lingvaj malfacilaĵojn; sed oni akceptas ilin kiel neŝanĝeblan fatalon. Se Germanujo estus akceptinta ankaŭ la Versajlan diktaton kiel fatalon, neniam ĝi sukcesus nuligi tiun dokumenton.

Oni ne scias, ĉu — kiel esperantisto — oni ridu aŭ ploru pri tia nekredebla miopeco en lingva rilato, kiam oni legas, ekzemple, pri la perado de l'interpretistoj, ke ĝi « kompreneble » (!!!) efikis temporabe. Kompreneble, jes! Sed ni ne povas mense kapti, kial oni « kompreneble », rezignacie, kun pendantaj brakoj, devas akcepti tiun temporaban staton, dum ke la preta rimedo, por plibonigi tiun staton, jam delonge ekzistas kaj plene funkcias! Sed, « kompreneble », Esperanto restas plu « nedezirata ». Cis kiam?

(BELGA ESPERANTISTO)

ESPERANTO IN THE FRENCH ARMY.

Premier Edouard Daladier, of France, while Minister of War, issued permission for Esperanto classes for Officers and Men in the Army Service-Dec. 26 1937

PER ESPERANTO.
From one of the 3 radio stations in Ireland, giving regular Esperanto Broadcasts, a lecturer told the Irishfolks in Esperanto-about the beauty and benefits of their own GAELIC. (For best results always use the best tools.)

Esperanto kaj la franca armeo.
Paris 9 nov.: La franca ministro por Nacia Defendo kaj Milito akceptis la organizon de perkorespnda esperanto-kurso kaj sendis pri ĝi ĉirkuleron al ĉiuj generaloj, por ke ili konatigu al ĉiuj militistoj sub siaj ordonoj kiamaniere ili povas senpage lerni Esperanton.
Paris 14 nov.: Per ĉirkulero la franca ministro pri Aviado permesis la organizon de Esperanto-kursoj ĉe la aviad-armeo ekster la deĵorhoroj. Jam de kvar jaroj funkcias laŭvolaj Esperanto-kursoj ĉe la Supera Lernejo pri Aviado.

(British Press Service)

UNUECO ESTAS FORTO

Advt., rates-25 words 25¢-3 times for 50¢. Page \$4.00. 1/2 Page \$2.50.

ESPERANTO SOCIETY OF
 Oklahoma City, Okla.




Has elected the following officers:
 President S.N.Bunch,
 460 1st Nat'l Bldg.,
 (picture at right)
 V-Pres., Miss Bernice
 Rayburn; Treasurer,
 Mrs. Kristine Bennett
 (picture at left);
 Sec'y Miss Vera W.
 Stovell, 565 1st Nat'l
 Bldg. (Sorry we cannot
 picture more of this
 up and coming organi-
 zation, which is mak-
 ing Oklahoma and sur-
 roundings Esperanto
 conscious. BONVENON.



ESPERANTO SOCIETY OF DETROIT. At their annual meeting elected following :
 President Joseph H. Murray (re-elected); V-President Miss Edith L. Johnson;
 Treasurer Miss Ethel Campbell; Secretary Mrs. Robert L. Davis, 4321 Fourth
 Avenue. A Zamenhof Day dinner and program is planned. The principal
 speaker will be Mr. Philip A. Adler of the "Detroit News", who has rec-
 ently completed a trip around the world. His subject will be "The Diver-
 of Tongues in Central Europe".

* * * * *
ESPERANTO ASSOCIATION OF LIMA. (Ohio). Six months ago Lima had one Esperant-
 ist--Mrs. Luella K. Beecher. A true believer in numbers, she decided that
 her friends should have the opportunity of enjoying the pleasures afforded
 only to true Esperantists--the thrill of correspondence with people in all
lands--mutual understanding--being one of them. To think was to act. Act one--
 the newspapers; Act 2--Radio Talks; Act 3--invited Miss Lidia Zamenhof--Star
Cseh-Method Esperanto Teacher of the World--to Lima. Result: a group of over
60 enthusiastic Esperantists. And here are the officers, recently chosen:
 President, Mrs Luella K. Beecher (KOMPRENEBLE); V-Pres., Mr. Bernhard Lade;
 Treas., Mrs Florence Bolton; Sec'y, Miss Veldine Vaughn, 509 N. Collett St.

MISS OLIVE V. MARSH, Long Beach, California, one of EANA's most consistent
 members, is Secretary of St. Luke's Choristers, (a choir of boys trained by
 Mr. William Ripley Dorr) who have achieved fame--little less than the Paulist
 Boys Choir--and have taken part in 23 of the outstanding sound pictures on
 the screen of recent years. Notable is Raymond Chace in "Boys Town," an M-G-M
 picture--"His exquisite voice, with Edward Ward's direction, and M-G-M's rec-
 ording, combine to make a musical effect of rare beauty". Surely she is
 proud of them.

 Professor John P. Robertson, of Drexel Institute of Technology in
 Philadelphia, is teaching (Cseh-Method) Public Esperanto classes
 Mondays and Fridays, a class of Drexel students Tuesday afternoon
 and a Progresia Kurso Thursday evenings. Professor Robertson, Mrs,
 Ruth Robertson, Edward W. Pharo Jr., and Sammy Martin achieved
 Cseh-Method certificates during Miss Zamenhof's sojourn in America, VIVU!

Universal Language Offers Means Esperanto tra la mondo

★★★ To Permanent Peace ★★★

Editor, The Pittsburgh Press:

In your issue of Oct. 27 I read with very keen interest Mr. A. L. McCray's letter concerning a universal language in order to promote a better understanding among nations, toward a permanent peace.

Esperanto, also known under various names viz: modernized Latin, auxiliary or second language, is the most practicable international language yet conceived.

I have been an Esperantist since 1900 and still derive from the language no end of pleasure and profit by reading Esperanto literature and corresponding with other Esperantists in many parts of the world.

This language, indeed, is the easiest and most interesting of all languages, in fact, it requires only one-tenth of the time necessary to learn any national tongue, to acquire a good command thereof. Every word is pronounced as written, and each letter has only one sound. Besides, it possesses the most remarkable flexibility and is entirely devoid of ambiguity found in most of the national languages. However, one not familiar with Esperanto has to go through a text-book in order to appreciate its intrinsic value.

About 35 years ago The Pittsburgh Dispatch gave for a considerable while a daily lesson in Esperanto and had a large following, as many older readers, no doubt, may recall.

Therefore, why does your paper not take the task up and add hundreds of new readers, mostly young people, to your long list. I suggest that you ask your army of readers to give their views on that and see how many respond.

Esperanto is on a very large scale being taught in most of the schools and colleges in the old world. In our country the language is a part of the curriculum in a few public schools and colleges.

As a matter of fact, Esperanto has been growing by leaps during the last few short years, after being more or less dormant from the outbreak of the World War until about a decade ago.

Unless I mistake, at least 50 per cent of the British population is Esperanto-minded, besides there are some 250 schools and universities, including the renowned University of London, in Great Britain, that have Esperanto on their curriculum, therefore why let our British cousins out-do us Americans?

DR. I. L. KINNEY,
Duquesne, Pa.

Universal Language Would Benefit World

Editor, The Pittsburgh Press:

The Tower of Babel will be remembered as the place where "God confused their tongues." This justifies no righteousness nor extolls the virtues of any one tongue as all were conceived in sin.

A way has been left open to mankind whereby all may enjoy a fuller life, the threshold to a better understanding among all nations. The pen may be "mightier than the sword." The tongue can and will be mightier than the pen.

Coming generations justly deserve a finer life than has been our lot. This battle-scarred world is slowly awakening to the fact that the path of glory is not strewn with rose petals. A debt of today is the aftermath of a sin of yesterday. Wars of today will likewise cast a burden on the childhood of tomorrow.

On occasion one or more of the better minds delve into the possibilities of a universal language. Untold are the benefits that could be derived if a universal tongue were incorporated into the school system of every nation.

In time the nations of the world could erect on a neutral spot a super broadcasting station where the world's people could be informed as to the world's state of affairs in a tongue understandable to all. A visionary dream? The children of today are the adults of tomorrow. A decade or two, the goal a better and fuller understanding, a world with something in common.

A. L. McCRAY,
Conway, Pa. Oct. 27 '38

Mr. McCray is one of the 'one-time' Esperanto fervor-uloj awakened by the articles of Dr. Kinney. He is a veteran of the World War-enlisted when only 14--Oh no! he does not want another war-no one with war experience does.

Brazilo. La ŝtata Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko decidis ĉe sia ĝenerala kunido, ke ĉiuj artikoloj en oficiala organo „Brazilia Revuo de Geografio“ enhavu esperantan resumon. Krom tio la brazilaj statistikaj departementoj uzos Esperanton por sia korespondado eksterlanden.

Anglio. Pri la sukcesa 30-a Universala Kongreso en Londono aperis en la brita gazetaro notoj aŭ artikoloj ĉirkaŭ 600-foje. Mondrekorda aviadistino Amy Janson, fame konata pro siaj rekordflugoj de Anglio al Aŭstralio, Hindio, Japanio kaj Sudafriko diris pri Esperanto: „Mi kredas, ke ĝi estus ekstreme utila. Estus granda helpo, ekzemple, se ĉiuj aviadaj terminoj estus nomigitaj kaj koprenataj egale en ĉiuj landoj. La flugado povas venki la plej multajn barilojn, sed ankoraŭ devas cedi al tiu de lingvo; kaj tio povas esti tre ĉagrena barilo, kiel mi mem jam spertis“.

Ĉeĥoslovakio. La ĉeĥoslovaka poŝto, kiu jam aperigis poŝtkartojn kun teksto ĉeĥa-esperantlingva, eldonis kvar novajn poŝtkartojn kun la sama teksto. Sed krom la teksto sur tiuj poŝtkartoj estas uzataj ankaŭ Esperanto-motivoj por turisma propagando.

Japanio. Malgraŭ tio, ke en la malproksima Oriento furiozas kruela milito, kiun provokis Japanio notas kelkajn bonajn rezultojn. La urbo Osaka eldonis gvidilon de Osaka en Esperanto. Similan gvidilon de la uzino en Omija eldonis la Fervoja Ministerio. Ĝi eldonis krome konversacian libron kun Esperanto-teksto. Radiostacio de Tokio disaŭdigis du paroladojn pri la Esperanto-movado.

Finlando. En la jaro 1924 permesis la finna fervoja administracio fari prelegojn pri Esperanto ĉe la fervojistoj. En la jaro 1936 ĝi enkondukis Esperanton en siajn lingvajn kursojn kaj permesis surmeti sur murojn de la atendejoj de 30 stacidomoj tabulon pri la lokaj esperantistoj, kiuj senpage gvidas eksterlandajn turistojn esperantistajn. Antaŭ kelkaj semajnoj la sama administracio permesis afiŝigi en la atendejoj de stacidomoj deklaracion pri Esperanto kaj kiamaniere oni povas ellerni tiun lingvon. La afiŝo enhavas ankaŭ la adresojn de en-kaj eksterlandaj Esperanto-organizoj.

Hungario. Sur la kovrilpaĝo de la novaj hungaraj telefonlibroj de Budapeŝto estas menciita la telefonservo inter aliaj lingvoj ankaŭ en Esperanto. La hungara poŝto eldonis ĝis nun entute 48 poŝtkartojn kun la Esperanto-teksto.

(„La Suda Stelo“)

121 francaj deputitoj apogas Esperanton.

En Francujo ekzistas Esperantista Parlamenta Grupo, al kiu aliĝis jam 150 deputitoj diverspartiaj. Ĝenerale, en Francujo la intereso por la internacia lingvo neniam de post la mondmilito estis tiel vigla kiel nun.

★★★

Heroldo de Esperanto

ESPERANTO by CORRESPONDENCE. Beginners; Advanced. Instructor licensed by E. A. N. A. as teacher. Esperanto Institute, St. Albans, N. Y. Usono.

ESPERANTO kaj la FRANCAJ DOGANOJ. Paris Nov. 24 : Sekve de raporto post la Internacia Konferenco "Esperanto en Moderna Vivo", la ĝenerala direktoro de la doganoj decidis unue, ke la doganistoj, kiuj scias paroli esperante, povos, deĵorante, surporti la verdan stelon; due, ke la informoj pri doganaferoj, jam tradukitaj en fremdaj lingvoj, estos de nun ankaŭ ciam tradukitaj en Esperantan lingvon.

ESPERANTO EN FRANCAJ LERNEJOJ. Paris Nov. 2 : La Franca Ministro de Instruado, s-ro Jean Zay, per cirkulero rajtigis la instruistojn instrui Esperanton al la lernantoj dum la sabataj lecionoj. La decido de la Ministro devas esti konsiderata kiel la unua paŝo enmeti Esperanton en Francajn Lernejojn.

ESPERANTO EN SVEDA UNIVERSITATO. Stockholm Nov. 5 : Por la unua fojo la helpilingvo Esperanto estas uzita en sveda disertacio. D-ro Ernst Olsson ĉe Stockholm Universitato dum pluraj jaroj studis ankaŭ en Leningrad kaj Parizo, kie li ricevis konsiderindan helpon en siaj sciencaj studoj pere de Esperanto. La nun aktuala disertacio temas pri "Esploro pri la spektroj de sulfuro, seleno kaj teluro".

TALKS ABOUT THE ESPERANTO MOVEMENT are now frequently broadcast from the radio station in Pretoria, South Africa. Thus one more country is represented among the great number of wireless authorities who now recognise the International Language to be of practical use. Every month over 80 broadcasts take place actually in Esperanto, for the most part in Europe, but North and South America and Australasia are also represented.
(British Press Service)

CONGRATULATIONS TO U.S REPRESENTATIVE KARL STEFAN of Nebraska. His constituents appreciate his good qualities so much, they have acquired the habit of 'voting him in' at each succeeding election-and we, Esperantists, like to listen to him when he favors our meetings by his presence. GRATULO!

ESPERANTO, INTERPRETOR OF NATIONS. The late Will Rogers is reported to have said that he never met a man whom he did not like. I am sure none of the rest of us could say that! (Self-preservation forbids.) But it is easier to believe there is probably no nation which--on its finer side--we would not like, if we really became acquainted with it. What better way can there be to get acquainted with the inner life and aspirations of a whole people than by a well prepared ANTHOLOGY of its literature, made available to us through Esperanto? So it is one of the significant features of Esperanto activity in the past dozen years that such anthologies of national literatures have been appearing, one after another, and that still others are in preparation. I have recently had occasion to be reading three such anthologies in Esperanto; and they have fulfilled their mission of giving a fresher and clearer realization of the inner life of three among the smaller nations. One of these was the Swedish Anthology, which gave a new feel for the forests and stormy coasts of the northern land, and its rugged history. Another was the Flemish Anthology, which gives expression to the life-and outlook of the folk of northern Belgium. But when I turned from these to the anthology of Bulgaria, I met a glad surprise. I expected from that little-known land of the Balkans something less interesting, something a bit amateurish if not even crude. What a delight to find the book the most vivid and fascinating of the three! The hope expressed in its preface was justified--that this presentation of the Bulgarian literature would gain new respect for a country too often despised. By such vistas as these into other lands, other peoples, Esperanto well pays for the relatively small labor of mastering it for fluent reading purposes. Every such book, and every reader of such books, bring human brotherhood a little nearer.

L.G.Dodge

MILIONOJ DA FLUGFOLIOJ! TEO JUNG, redaktoro de "Heroldo de Esperanto" kun sia ciam vigla optimismo kaj praktika entuziasmo rekomendas ke la lingva malfacilaĵo dum la grava, historia kunveno de la kvar plej eminentaj viroj de Eŭropo (Chamberlain, Daladier, Hitler kaj Mussolini) estu uzata por grandskala varbado por Esperanto. Li proponas ke milionoj da flugfolioj estu presataj en naciaj lingvoj, kaj dissemataj amase en ĉiuj urboj de la mondo. Jen:

M U N I C H A N D L O N D O N

In Munich in September 1938 the four most eminent men of Europe were unable to talk directly to each other.... They had to depend upon interpreters at a time when a slight misunderstanding meant life or death to millions of men, women and children:

Chamberlain talked English
Deladier talked French
Hitler talked German
Mussolini talked some French, English and German

In the British Capital one week in August 1938 1600 men and women from every walk of life coming from 30 different countries, met in annual World Esperanto Congress and all could easily understand each other (without any interpreters) by speaking the neutral auxiliary international language ESPERANTO.

For information and free sample text write to:
(local address and telephone number)

Ĉiu Esperanto-Klubo devus presigi kelkajn mil flugfoliojn kun la supra teksto. Ni ne povas dissemi ilin per aeroplanoj kiel militistoj. Do ĉiu samideano devas aĉeti de la klubo 300-500-1000 flugfoliojn kaj disdoni ilin al ĉiuj geamikoj, kaj dissendi ilin en leteroj privataj kaj komercaj. Ni devas porti ilin al gazet-redaktoroj, lasi ekzemplerojn en tramoj kaj aŭtobusoj, disdoni ilin al vendistoj okaze de ĉiu aĉeto en negocejoj, kaj disdoni ilin okaze de ĉiu kontakto kun aliaj homoj. Tuj kiam venas inform-peto, samideano devas fari personan viziton kaj montri ke (free sample text) "Inteligenta persono lernas la lingvon rapide kaj facile. Esperanto estas moderna, kultura lingvo de la tuta mondo. Simpla, fleksebla, praktika solvo de la problemo de internacia kompreno. Esperanto meritas vian seriozan konsideron". Persona varbado estas tre utila. Sed ankaŭ sendu la nomon kaj adreson al Washington, D.C., por plua varbado. Leteroj de Washington helpas al la lokaj varbantoj. Ni ĉiuj konstante propagandu, kune, diligente!

MISS NANCY FEATHERSTONE, Los Angeles, though one of our newest members, is taking such an active part in connection with the membership committee that good results of her work are already in evidence. She is an indefatigable aid to the chairman-Miss Maybelle Anshutz (PATRONINO). BONVENON!

TEXAS ESPERANTIST. The last number is the most interesting yet, and indicates that the BLUE BONNETS are all very busy in work for Nia Afero. One of its features is an Esperanto Course-this installment covering four pages. The guiding stars of this enterprise: the ever active President of E A T Miss Philippa Stoneham, editor-in-chief of the Esperantist J. Frank Summers and Mr. K.A. Susuki-an expert in Esperanto for many years. Gratuloj.

EVERY ESPERANTIST SHOULD JOIN THE EANA AND IEL. **Ciam portu la Verdajn Stelojn!**

* * * * *
ESPERANTO TEXTBOOKS. (NEW PRICES) 16
 * * * * *

PRACTICAL GRAMMAR of ESPERANTO, by Dr. Ivy-Kellerman Reed, World-known member of the Universal Language Committee. Fourth edition (1938), 144 pages of grammatical explanations, vocabularies, dialogs and full exercises, both into and from Esperanto. For Beginners or Advanced students. New Price, only 60¢

ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. American edition (1937) 7 Lessons, with key to each. Grammar, pronunciation and word formation clearly explained and easily understandable. Over 50000 have been sold. 20¢

BENSON'S ESPERANTO COURSE-650 pictures are a great help to the student... 25¢

PRACTICAL COURSE in ESPERANTO, by Dr. Szilagyi, conversational text with amusing pictures and vocabularies. For beginners and intermediate. 50¢

BILERNU-same author-same style as "PRACTICAL COURSE", for advanced 65¢

STEP by STEP in ESPERANTO, by M.C. Butler. A universal favorite for years. For beginners or advanced students. Cloth covers 75¢, paper covers 60¢

GRAMMAR AND COMMENTARY, by Gen. Cox. Filled with hundreds of examples of words and phrases, which might bother the student-a classic. \$1.00

EASY COURSE in ESPERANTO by Karl Froding. The adjective tells the story.. 10¢

MILLIDGE'S ESPERANTO-ENGLISH Dictionary has no equal, indispensable. \$2.50

FULCHER & LONG'S ENGLISH-ESPERANTO Dictionary-companion to Millidge's. \$2.30

EDINBURGH DICTIONARY, Esperanto-English & English-Esperanto. Pocket size, Ideal for all Esperantists. Eventually you must have it, why not now? 75¢

ENGLISH-ESPERANTO KEYS. Vest pocket size. Always a handy companion. 05¢

EASY & INTERESTING READING *"Fine de Komprenas la Radion"* \$1.32

KARLO, a school story by E. Privat. 20¢ **FABLOJ de EZOPO**-Aesop's fables. 25¢

La **"KARAVANO"**. Seven terse tales . 25¢ **LA TASO de AMSERVO**. 20¢

SEP RIDOJ. Seven BIG LAUGHS. 25¢ **RAKONTOJ kaj AVENTUROJ**. 15¢

LA MOPSO de LIA ONKLO-hair curling, 15¢ **LA REGNO de L'VERO**-Koliner-. 15¢

JUNECO KAJ AMO-Payson-. . . . 15 and 25¢ **EVOLUO de TELEFONO**-scientific. 20¢

VETERANO?, DR. ISMAEL GOMEZ BRAGA, The early experiences of the writer. This is the first original composition printed in Brazil. Very interesting. . . . 60¢

The following books will be sold for 20¢ each or 6 for \$1.00: **Princo Vance'** (not bound). **BLANCHE**-Virgulino de Lille. **ROZUJO de CIUMILJARA J. GINEVRA**-a 3 act lyrical drama. **AKROBATOJ de NIA SINJORINO MISERERE KAJ THAIS**. **GIS la REVIDO**, a one act sketch, very amusing, 5¢-7 for 25¢. **VERSATAJOJ**-forty pages of poems. 15¢-2 for 25¢. **LA DEVO**. 25¢-5 for \$1.00. **KIEL PLACAS AL VI** (As You Like It) tr. by Dr. Ivy Kellerman Reed, 30¢. A few copies of **"La VOJO RETURNTE"** (The Way Back) \$2.00 and **"PER BALONO AL LA POLUSO"** \$3.00.

SONG BOOKS. **"KANTU NI"**, 10 songs and music, 15¢. **"Komuna Kantlibro"** 34 songs and music, 25¢. 1937 and 1938 **EANA CONGRESS BOOKS**, 25¢ each. Contents are very interesting (some classic). Much cherished souvenirs-and Gifts.

* * * * *

TO "BE IN THE KNOW" of Foreign affairs appertaining to the Esperanto movement, subscribe for some of the **ESPERANTO PAPERS**-almost every European country, and a few Asiatic and South Americans, also publish papers in la kara lingvo.

"HEROLDO de ESPERANTO", weekly, all Esperanto, Official organ of I.E.L. Year \$3.85

"Esperanto Internacia", Monthly, " " " " " " \$1.50

"La Praktiko", monthly, all Esperanto. Instructive, amusing and well illustrated. Official organ of the Cseh-Esperanto Institute. \$1.40

"La Juna Vivo", monthly, all Esperanto. Splendid for beginners-from 10 to 90. Lessons, pictures and short stories, 75¢. A whole year collection for 75¢

"BRITISH ESPERANTIST", Monthly. English and Esperanto. Established 1904. Well edited and illustrated-a world favorite. 75¢

* * * * *

JUST OFF THE PRESS, Just what we've all been looking for these many months, The **"AMERICAN POCKET DICTIONARY"** by Karl Froding. 80 pages of **ESPERANTO-ENGLISH** and **ENGLISH-ESPERANTO**, with essentials of Grammar and Word formation. This pocket size book is unique in that it gives the whole word-instead of "roots" only, as given in many others-a great improvement. Karl has worked hard "to get out the best" so let's all get one **WORTH MORE**, but sells for 25¢. We had to tear out another item to make room for this late important NEWS.

Send orders to E A N A 1517 H St., N-W, Washington, D.C.

* * * * *